Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 6-an de februaro 2025 per Zoom

Ĉeestis Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo. La tagordo aprobiĝis.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 9-an de januaro 2025
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Esperantonia
Ni kunlaboras kun la tri verkistinoj, kiuj laŭplane luos kaj uzos Esperantonia-n kun ni. Claude estas kontaktpersono de NEL, Harald Rygg de la klubo de Oslo. La du kontaktpersonoj interrilatas kun la tri verkistinoj kaj decidos la praktikajn detalojn pri pretigado de la ejo kaj prova luperiodo. La verkistinoj sendis al ni planon pri la unuaj monatoj, pri kies enhavo ni principe konsentas:

- Februaro estas monato por ordigi kaj prepari la ejon. Neniu lupago estos petata.
- 01.03. – 31.05. – provperiodo. Lupago: 4600 kr. monate + elektro. NEL dum tiu periodo prizorgos la ordigadon, malplenigadon kaj purigadon de la supra oficejo.
- Ekde 1.6. la luontoj uzos ambaŭ ĉambrojn (ĉefan + supran). Lupago: 5600 monate + elektro.
- La luantoj povas uzi la ejon lunde-vendrede inter la 7-a kaj 17-a horo. Krome: vespere, kiam nek la Esperanto-klubo de Oslo, ned NEL ĝin bezonas.
- La luantoj povas aĉeti novan, uzitan sofon kaj depreni la koston de la lupago.

4.-5. Jarraportoj 2023 kaj 2024. Bård verkis proponon. Ni aldonis kelkajn pliajn informojn.
6. Jarkalkulo
NEL havis en 2024 preskaŭ 53 000 kronan ordinaran malprofiton. Post enkalkulo de financaj en- kaj elspezoj, la malprofito reduktiĝas al 16 500 kronoj. La elspezoj por Norvega Esperantisto kreskis multe (pro koloroj, pli da numeroj ktp.) Ni havas konsiderindan monon en la banko kaj en fondaĵoj. La luigado de Esperantonia al la verkistinoj signife plibonigos la ekonomian situacion.

7. Biblioteko kaj librovendado
En niaj informejoj estas menciitaj ebleco mendi librojn. Ni provos interkonsenti kun la luontinoj, ke ili prizorgu eventualan forsendadon de eventualaj, mendotaj libroj. Bård elektos librotitolojn, por ke ni faru novan liston de vendeblaj (kaj ekspozicieblaj) libroj.

8. Retpaĝoj Bård skribis dokumenton kun ŝanĝproponoj. Jardar korektos la hejmpaĝon.

9. Norvega Esperantisto kaj la Nacia Biblioteko
Jardar skribis novan leteron al la Nacia Biblioteko hodiaŭ, kies ĉefa enhavo estas: *«Ville det vere mogeleg å gi innloggingsfri tilgang til Norvega Esperantisto, og samstundes behalde varselet 'Dette materialet er beskyttet av opphavsrett'?»* Ni atendas respondon.

10. Dumviva membreco La kotizo estas 25-obla kotizo.
11. Instigo al donaco de dumvivaj membroj Eventualan instigon ni faru en Norvega Esperantisto.

12. Kion fari pri la nepagintoj?
Memorigo pri membrokotizo estas sendota al ĉiuj, kiuj pagis lastfoje en 2023 aŭ 2024. Sed *Norvegan Esperantiston* oni ne plu sendu al tiuj, kiuj pagis lastfoje en 2023.

13. Venonta estrara interkonsiliĝo: ĵaŭdon la 20-an de marto 2025 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund